




## PILO-PRESS

Internacia  
Informservo



Eldonanto/Herausgeber:

Ludwig Pickel  
Postfach 2113  
D-85 Nürnberg 1  
Tel. (09 11) 46 36 49; 51 42 69

N-ro 1/1974. 4 jan 1974  
Aperas ĉiusemajne

*Warszawa* 1974

### Prezidentaj novjaraj salutoj en Esperanto

Vieno (pp) Je la iniciato de la mallongonda servo de la Aŭstria Radio (ORF) la Aŭstria Federacia Prezidento D-ro Franz Jonas direktis persone parolatan novjarsaluton al la tutmonda esperantistaro en la kadro de la novaj ĉiusemajnaj Esperanto-elsendoj sur mallongaj ondoj, la 29an de decembro kun ripeto je la 30an de decembro 1973.

La elsendo tekstis jene:

"Karaj geaŭskultantoj! Parolos nun la Federacia Prezidanto de Aŭstrio, samideano d-ro Franz Jonas:

'Karaj gesamideanoj! Okaze de la jarkomenco mi sendas al ĉiuj esperantistoj kaj amikoj de Esperanto plej korajn salutojn kaj bondezirojn. Komune kaj en la sama spirito ni varbu por internacia kunlaboro kaj interkompreniĝo. Tre vasta celo estas la mondpaco.'"

\*\*\*\*\*

### Honorigo por jugoslavia esperantisto

Zagrebo (mĝ) La ĝenerala konsulo PR Pollando en Jugoslavio, Stefan Nowak, honoris la 17an de decembro 1973 en Zagrebo per medalo Kopernik kvin jugoslaviajn elstarajn scienculojn, inter kiuj troviĝas la prezidanto de Jugoslavia Akademio, D-ro Grga Novak, kaj la direktoro de Zagreba observatorio, D-ro Gabro Divjanoviĉ. D-ro Divjanoviĉ estas esperantisto ekde la jaro 1934; en 1960 li iniciatis fondon de Esperanto-kampadejo en Primoŝteno, eldonon de kelkaj Esperanto-libroj, kaj jam 10 jarojn li redaktas la revuon "Homo kaj Kosmo". Gratulon pro la alta honorigo!

### Esperanto-societo en Primoŝteno

Primoŝteno (mĝ) Post multaj provoj jen efektiviĝis multjara revo: sekve de iniciato de magistro Aleksa Hrstiĉ el Split, kiu gvidis Esperanto-kurson en Primoŝteno, la 12an de decembro 1973 okazis fondkunveno de Esperanto-societo en Primoŝteno.

### Alvoko

Romo (pp) Okaze de la granda turisma movado al Romo antaŭvidita por la sankta jaro 1974-1975, la provinca turisma organizaĵo de ROMO (E.P.T.) sin deklaris preta republikigi bildajn broŝurojn pri romaj monumentoj kaj vidindaĵoj en Esperanto, kondiĉe ke ĝi konstatu pro la nombro da petoj, la utilon kaj oportunon de tialingva broŝurpresado. Do, bonvolu tuj peti la broŝurojn skribante al E.P.T., via Parigi n.1, I-00187 Roma.

## Laŭ la itala sperto

### Kiamaniere interesigi al Esperanto partiojn kaj registarojn

Kiel jam konate, Itala Socialdemokrata Partio (PSDI) proponis al la Socialisma Internacio la adopton de Esperanto kiel unuiga lingvo por la socialistaj partioj kaj la mondo de la laboro.

Tiu ĉi fakto havas egan gravecon, ĉar Esperanto povas venki sian batalon en la mondo nur se la registaroj kaj parlamentoj decidus enkonduki ĝin instruadon en la lernejojn kaj adopti ĝin en la internaciaj rilatoj.

Sed registaroj kaj parlamentoj, en preskaŭ ĉiuj ŝtatoj de la mondo, konsistas el homoj, kiuj estas tie por realigi la programon de la respektivaj partioj. Do: se la partioj interesigas pri Esperanto, parlamentanoj kaj registaroj agados favore al Esperanto; se la partioj, kontraŭe, ne interesigas pri ĝi, parlamentanoj kaj registaroj neniam prenos konkretan iniciaton favore al ĝi.

Estas klare, tamen, ke malfacile partio povos vere interesigi pri Esperanto, (kiu havas signifon nur se ĝi estas uzata internacie) se antaŭe ĝi ne akordiĝis almenaŭ kun 2-3 partioj de aliaj ŝtatoj, cele ĝin enkonduki samtempe en la respektivajn lernejojn kaj uzi ĝin en la reciprokaj internaciaj rilatoj.

Nun estas necese bone kompreni, ke partioj interesigas al la solvo de speciala problemo nur se interne de ili estas membroj, kiuj premas por ke la partioj interesiĝu al tiu problemo. Rilate al Esperanto estas necese, ke interne de ia ajn partio estu unu aŭ pli da esperantistoj, kiuj proponu al sia partio interesigi pri la adopto de Esperanto kiel lingvo por internaciaj rilatoj. Sed malmultaj personoj jam sufiĉas, kiel montras la fakto, ke la Itala Socialdemokrata Partio prenis la faman iniciaton pro la premo de...nur unu persono. Pro tio mi opinias utile klarigi kiel mi agis por ke aliaj povu agi same.

Do, mi devis labori, kiel socialisto, interne de mia partio. Komence, post multaj klopodoj, mi sukcesis aranĝi esperantan kurson en la sekcio de la partio en mia kvartalo. Pro diversaj kaŭzoj la kurso ne estis fruktodona, tamen, skribante pri ĝi, mi povis pretigi mian unuan artikolon pri Esperanto, kiun mi sukcesis publikigi en la gazeto de la partio. La artikolon sekvis leteroj de legantoj kaj mi povis publikigi ankoraŭ aliajn kvin artikolojn. Nun ĉajnis al mi, ke la tereno estas matura por stimuli reagojn.

Kun la helpo de la esperantistoj en diversaj urboj, mi klopodis kontakti kelkajn gravulojn de la provincaj federacioj de mia partio, kaj, fine mi sukcesis kontakti la estron de la provinca federacio de Trento. Dum la interparolo mi montris al li la artikolojn en la partia gazeto kaj donis al li jam pretigitan rezolucion petante lin voĉdonigi ĝin fare de la membraro de lia federacio. Poste mi reformveturis al Romo. La artikoloj plaĉis al li, kaj li prezentis kaj voĉdonigis mian rezolucion al la junulara provinca komisiono. Poste, li tuj sendis la voĉdonitan rezolucion, kiu i.a. proponas la adopton de Esperanto kiel internacian lingvon de la socialistoj, al la direkto de la partio.

La sekretario de la partio, tuj post ricevo de la rezolucio, sendis ĝin al la Socialisma Internacio por diskuto. Post la jesa respondo de Hans Janitschek, ĝenerala sekretario de la Internacio, mi fariĝis, kompreneble, iom pli grava en la medio de mia partio, kaj kiam mi proponis la dissendon de cirkulero al ĉiuj socialistaj partioj

por klarigi la celon de tiu iniciato, mia propono estis akceptita. Mi mem pretigis la tekston, en itala kaj Esperanto.

Tuj poste mi ankoraŭ proponis, ke okaze de miaj vojaĝoj eksterlanden al kongresoj esperantistaj, oni sendu min por paroli kiel "ambasadoro" al la estroj de la diversaj partioj. Ankaŭ tiun proponon oni akceptis. Kiel oficiala reprezentanto de la Itala Socialdemokrata Partio mi kontaktis en Kopenhago estraranon de tiu dana; en Berno, la sekretarion de la tiu svisa; en Hago, la sekretarion de tiu nederlanda; en Vieno, estraranon de tiu aŭstria.

Estas facile kompreni, el tiu ĉi raporto, ke la bazo de mia partio ankoraŭ preskaŭ tute ne scias pri Esperanto, kaj ne interesiĝas pri la lingva problemo. Por komenci veki ĝian intereson mi petis kaj atingis, ke la sekretario de la sekcio de mia kvartalo starigu prelegon kaj debaton pri Esperanto, fare de deputito Franco Nicolazzi, unua subskribinto de la leĝpropono, kiu antaŭvidas la instruadon de Esperanto en la italiaj lernejoj.

Mi krome petis kaj atingis, ke oni pretigu tekston de la cirkulero, adresota al la membroj de la sekcio, en la itala kaj Esperanto, kaj oni sendu ĝin, por informo, ankaŭ al la aliaj sekcioj de la provinco de Romo (preskaŭ 80), al la parlamentanoj kaj al la aliaj gravuloj. La prelego okazis la 21 nov 1973 kun granda sukceso. Mi invitis al la asambleo ĵurnaliston de presagentejo, kiu sendis raporton al la tuta itala gazetaro.

De tio, certe, sekvas novaj iniciatoj kaj gravaj rezultoj: jam okazis alia kunveno pri la sama temo en alia selcio de Romo.

Ĉio, ĝis nun, estas farita en malpli ol 2 jaroj.

Alberto Menabene, Romo

## Unua Konkurso de la Pola Radio en 1974

- 10-taga ekskurso tra Pollando
- multaj premioj kaj memordonacoj

en enketo de la Pola Radio, anoncita por la eksterlandaj aŭskultantoj.

Al partopreno en la lotado de la premioj rajtigas respondo almenaŭ al unu el la jenaj demandoj:

1. Kiujn internaciajn iniciatojn de Pollando vi opinias speciale gravaj kaj kial?
2. Kiuj problemoj estantaj objekto de la debatoj de la Konferenco pri la eŭropaj sekureco kaj kunlaboro plej multe interesas vin?
3. Kiuj elsendoj de la Pola Radio en la periodo januaro — februaro 1974, laŭ via opinio, plej interese prezentis la bildon de la nuntempa Pollando?

La respondojn ni petas sendi al la adreso: Pola Radio, PL-00-950 Warszawa, P.O. Box 46, Pollando — en kovertoj signitaj per la devizo: „Konkurso“, ĝis la 15a de marto 1974 (decidas la dato de la poŝta stampo).

La rezultoj de la konkurso estos anoncigitaj en niaj disaŭdigoj la 16an de aprilo 1974. La ekskurso de la laŭreatoj de la ĉefaj premioj okazos en periodo indikota de la Pola Radio.

Partoprenu mem kaj partoprenigu aliajn. Ni deziras al vi bonŝancon!

Pola Radio

### Varbado en naturamika medio

Saarbrücken (SEL) Sarlanda Esperanto-Ligo (6601 Scheidt, Parkweg 14) ĵus eldonis dukoloran afiŝon en formato A 4 kiu verbas por Esperanto en naturamika medio. Tiun ĉi afiŝon informcele ricevis ĉiuj membroj de la naturamika grupo de Dudweiler/Saar, laŭ instigo de ties estraro. Komence de 1974 la sarlandaj esperantistoj pendigos la afiŝon en ĉiuj naturamikaj domoj de Sarlando sekvante la ekemplon de la badenaj esperantistoj-naturamikoj. La afiŝo estas mendebla ĉe SEL je la prezo de 1,- DM po 10 ekz., plus sendkostoj.

### Jarĉefkunveno en Berlino

Berlino (Okcidenta) La jarĉefkunveno de la Esperanto-Ligo Berlino okazos marde, la 8 jan 1974, je 19a horo, en la restoracio "Landhausklause" Berlin-Wilmersdorf, Berliner Str. 17.

### Esperanto en la radio

Varsovio La elsendoj de Varsovio dum la festotaga sezono estis variaj, riĉenhavaj kaj interesaj el diversaj vidpunktoj. Tre plaĉis al mi persone la elsendo pri la pola poeto kaj esperantisto Julian Tuwim kun citaĵoj el liaj poemoj kaj la vintraj impresoj pri la praarbaro de Białowieża, kiu vekis aŭtunajn rememorojn. Cetere dum la festotagoj en Varsovio mankis neĝo, la temperaturo estis super nulo, kaj la redakcia deziro kristnaska estis i.a. la baldada alveno de frosta bela vintro. En retrorigardo al la jaro 1973 oni konstatis, ke 1973 ne estis malfavora jaro, sed ĝi ne metis mejloŝtonojn por Esperanto. Tio evidentiĝis ankaŭ el la dumjaraj Esperanto-Ekspresoj, kiuj ne povis raportii pri "grandaj sukcesoj". Cetere oni plendis pri malkresko de informiteco pri internaciaj eventoj. La novjara E-ekspreso surprizis per la elsendoj "Niaj gastoj en la 1973a jaro". Oni povis aŭdi la nepon de d-ro Zamenhof, Ada-Fighiera-Sikorska, Hans Schütt, Du Goninaz, Guido Bertucci, britan gaston, Josef Vitek, Rudi Graetz, Istvan Szerdahelyi kaj Nikola Aleksiev. El la politikaj elsendoj, i.a. ekstrakto el la novjara parolado de Edward Gierak, el komentarioj, el panoramo de internaciaj eventoj adidiĝis optimismo pri la estonta evoluo de la ekonomia vivo en Pollando kaj la politika agado sur internacia nivelo. Fine mi menciui, ke la aŭskultebleco de la posttagmezaj elsendoj en Nürnberg pliboniĝis.

Zagrebo. Kiel kutime la lasta elsendo de decembro respondis al la korespondantoj de aŭskultantoj kaj menciis aperintajn periodaĵojn, inter ili ankaŭ Pilo-Press. Mallonge oni menciis la interparolon de UK-delegacio de Hamburgo kun la alta protektanto ministro Klaus von Dohnanyi. El la novaĵoj el Jugoslavio oni eksciis, ke Jugoslavio nepre kondamnas la masakron de palistenensaj teroristoj sur la flughaveno de Romo kaj la posta forkonduko de aviadilo.

Berno. Ges-roj Gacond dediĉis du prelegojn al enketo pri junularaj aferoj. D-ro A. Baur prelegis pri la plej malgranda urbo de Svislando, nome Kaiserstuhl, kaj pri problemoj de la alpoj.

Romo. Bedaŭrinde tiuj elsendoj en Nürnberg ne estis kapteblaj, sed ni esperas, ke kun la plilongigantaj tagoj la aŭdebleco pliboniĝos.

### Radio Bervalio respondas...

D.: Ĉu la energetika krizo egaligas la diferencojn sur la trafika kampo inter komunistoj kaj kapitalistoj?

R.: Jes! La komunistoj havas nafton, sed ne aŭtomobilojn; la kapitalistoj havas aŭtomobilojn, sed ne havas nafton!

\*\*\*\*\*